Aŭd-vidaj prelegoj por esperanto-komencantoj

Claude Gacond, 326-a radioprelego, 1970.01.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nia laboro por Kultura Centro Esperantista, kiu estas nun kreata, nin kondukis al kontaktoj kun multaj esperantistoj en Svislando. Iom post iom ni akiris precizan bildon pri la ĉefaj problemoj ekzistantaj en la esperantistaj societoj.

A.- La ĉefa problemo ŝajnas esti la asimilado de la komencantoj. Ni rimarkis, tio estas en Svislando, ke neniu societo trovis solvon al tiu problemo. Oni eĉ vidas grupojn, kiuj decidas ĉesi organizi kursojn de esperanto, tiom tiu problemo venenas ĉe ili la grupan ekvilibron.

Cl.- Pro tio Kultura Centro Esperantista metis en sian labor-programon la pretigon de aŭd-vidaj prelegoj por komencantoj.

A.- Jen pri kio temas.

Cl.- Ni rikoltas seriojn de 36 interesaj kaj belaj diapozitivoj. Ni faras du kopiojn el ili. Kaj ni redaktas klarigojn, kies radik-provizo estas detalege kontrolata. Kun kelkaj kunlaborantoj, kaj helpe de la jam ekzistantaj listoj, ni redaktis provizoran fundamentan radikaron. Do, redaktante la klarigojn al tiuj lumbildoj, ni provas nur uzi vortojn, kiuj povas esti formataj helpe de tiu fundamenta radikaro.

A.- Ni redaktos 30 tiajn aŭd-vidajn prelegojn. Ni registros la klarigojn petante la kunlaboron de pluraj lertaj esperantistoj, por ke oni aŭdu plurajn voĉojn kaj por ke la prononco estu modela.

Cl.- Kaj tiuj prelegoj estos je la dispono de la grupoj, kiuj deziras organizi interesajn kunvenojn por komencantoj. La lingva nivelo ĉiam estos la sama. Por ĉiu aŭd-vida prelego ni redaktos ekzercaron, kiu permesos gvidi prilingvan laboron.

A.- 30 prelegoj, tio signifas 30 vesperojn. Tiuj vesperoj devos esti malfermitaj al ĉiuj interesatoj. Ili devos okazi ekstere de la societaj kadroj. Oni devos peti partoprenan kontribuaĵon, ekzemple po unu frankon por vespero. Povos veni komencantoj, ne-esperantistoj, kiuj deziras aŭdi esperanton, bonaj esperantistoj.

Cl.- Je ĉiu vespero oni anoncos la daton de la venonta vespero. Se la profito estos pli granda ol la elspezoj : luo de la salono, de la diapozitivoj (ni petos po 5 frankojn por prelego), pago de la invitiloj, kaj tiel plu, tiu profito devos esti uzata por aperigi anoncojn en la gazetoj.

A.- La komencantoj, kiuj regule partoprenos tiujn aŭd-vidajn prelegojn, ricevos nutraĵon, kiu korespondas al ilia asimil-kapablo. Kiam tiuj prelegoj ŝajnos al ili tro facilaj, tiam ili povos riski viziti la grup-kunvenojn.

Cl.- Jen la solvo, kiun ni celas. Tio signifas, ke la grupaj kunvenoj devos esti programitaj laŭ novaj kriterioj. Ĝis nun oni tro ofte provas resti je meza nivelo por ne malkuraĝigi la komencantojn. Fakte oni malkontentigas ĉiujn. La komencantoj tamen perdas la kuraĝon, ĉar ili malmulton komprenas kaj ne ricevas nutraĵon, kiu respondas al iliaj bezonoj, la lertaj esperantistoj perdas la emon kunveni, ĉar ili havas la impreson nenion lerni. Nur restas la eternaj balbutantoj, la progresantoj kaj la senokupaj personoj.

A.- Tiu priskribo, kiu resumas la situacion en Svislando, devas nepre ŝanĝiĝi, se ni volas, ke la movado progresu. Do per niaj aŭd-vidaj prelegoj por la komencantoj ni celas la forigon de la porkomencantaj priokupoj en la grupoj.

Cl.- Por ke vi havus ideon pri tiuj aŭd-vidaj prelegoj por komencantoj, jen la komenco de la teksto de la unua prelego. La diapozitivoj rilatas al la **vivo en hinda vilaĝo**. Oni vidas

fiŝkaptistojn, ŝnur-fabrikistojn, kamparanojn, religiajn statuojn, feston, kaj tiel plu. Estas belaj bildoj, kiuj donas bonan ideon pri la vivo en tiu marborda vilaĝo.

A.- Kiel vi konstatos, la klarigoj permesas imagi la bildon. Ĉiun klarigon sekvas du demandoj, al kiuj la aŭdantoj devas respondi. Poste ili aŭdas la bonan respondon kaj havas momenteton por ĝin ripeti. Tiel ili ne restas pasivaj. Per la bildo ili facile komprenas la klarigojn, eĉ se ili uzas kelkajn vortojn ne ankoraŭ lernitajn. Jen la unua bildo :

Cl.- *« Ni estas en suda Hindio.*
Matenas.
La suno ĵus leviĝis.
La maro estas tute trankvila.
Sur ŝipetoj fiŝistoj reveturas al la marbordo.
Ili ne plu fiŝkaptas.
En la vilaĝo, kiun ni ne vidas, la infanoj kaj familianoj atendas la kaptitajn fiŝojn.
Per tiuj fiŝoj ili pretigos bonan manĝon

Ĉu la suno ĵus leviĝis ? »

A.- La partoprenantoj devas respondi : **Jes, la suno ĵus leviĝis.** Tiam ili aŭdas la bonan respondon.

Cl.- *Jes, la suno ĵus leviĝis.*

A.- Ili havas momenteton por ripeti tiun respondon antaŭ ol aŭdi la duan demandon. Por la sekvo de la prelego mi ludos la rolon de la aŭdantoj. Do mi ripetas : **Jes, la suno ĵus leviĝis.**

Cl.- *Kio estas tute trankvila ?*

A.- **La maro estas tute trankvila.**

Cl.- *La maro estas tute trankvila.*

A.- **La maro estas tute trankvila.**

Cl.- *Jen fiŝisto, kiu albordiĝas.*
Li staras sur la sabla marbordo kaj tiras sian ŝipeton for de la maro.
Sur lia ŝipeto ni rimarkas diversajn ilojn uzatajn pro la fiŝkaptado.
Ni ĉefe vidas ŝnurojn.
La ondoj estas tre trankvilaj.
Sur la sabla marbordo ili formas belajn desegnaĵojn.
Maldekstre sur ŝipeto troviĝas ses personoj.
Du el ili sidas.
Kvar staras.

Maldekstre kiom da personoj staras sur la ŝipeto ?

A.- **Kvar personoj staras.**

Cl.- *Kvar personoj staras sur la ŝipeto.*

A.- **Kvar personoj staras sur la ŝipeto.**

Cl.- *Ĉu la fiŝisto tiras sian ŝipeton for de la maro ?*

A.- **Jes, fiŝisto tiras sian ŝipeton.**

Cl.- *Jes, fiŝisto tiras sian ŝipeton for de la maro.*

A.- **Jes, fiŝisto tiras sian ŝipeton for de la maro.**

Cl.- *Jen fiŝistoj, kiuj albordiĝis.*
Ili tiris sian ŝipeton for de la maro.
Nun ili rikoltas la fiŝojn, kiujn ili kaptis.
Tiuj fiŝoj ne estas tre grandaj.
Ili tamen permesos pretigi bonan manĝon.
Kaj ili alportos gajnon al la fiŝistoj.
Malantaŭ la sabla marbordo ni vidas palm-arbojn.
La vilaĝo sin kaŝas en la palm-arbaro.
Inter la du fiŝistoj staras knabo.
Li rigardas la fiŝistojn kaj atendas sian patron, kiu ankoraŭ ne revenis.

Kion atendas tiu knabo ?

A.- **Tiu knabo atendas lian patron.**

Cl.- *Tiu knabo atendas* ***sian*** *patron.*

A.- **Tiu knabo atendas sian patron.**

Cl.- *Ĉu tiuj fiŝoj alportos gajnon al la fiŝistoj ?*

A.- **Jes, tiuj fiŝoj alportos gajnon.**

Cl.- *Jes, tiuj fiŝoj alportos gajnon al la fiŝistoj.*

A.- **Jes, tiuj fiŝoj alportos gajnon al la fiŝistoj.**

Cl.- *Tiu knabeto helpas sian patron.*
Li portas la ŝnurojn, kiuj estis en la ŝipeto.
Malantaŭ li ni vidas du aliajn knabojn, kiuj ankaŭ helpas sian patron.
Ili portas fiŝkaptilojn. »

A.- Jen kiel sin prezentas tiuj aŭd-vidaj prelegoj por komencantoj. Kultura Centro Esperantista ilin ne nur ludonos al esperantistaj grupoj en Svislando, sed ankaŭ al esperantistaj societoj en aliaj landoj. Do se iu el vi interesiĝas pri tiu materialo, li povas peti pliajn klarigojn. Se ili havas ĝeneralan karakteron, ni ilin donos pere de la radio. Se ne, ni respondos perletere.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: Stefano KELLER, septembro 2012